

Kulturaj Kajeroj

DUMONATA INFORMADA KAJ KULTURA REVUO

Direktoro : P. BABIN, prezidanto de la Kulturdomo de Franclandaj Esperantistoj, 44 - NANTES, Francujo

JARABONO :

Simpla : 10 fkoj
Bonfara : 15 fkoj

P. BABIN
13, boulevard de la Chauvinière
44 - Nantes
P.Ĉ.K Nantes : 2.813.61

(Vidu la liston de niaj perantoj sur paĝo 4)

NOVEMBRO - DECEMBRO

1972 6

KULTURAJ KAJEROJ

1972 NOVEMBRO-DECEMBRO

Dumonata informada kaj kultura revuo

REDAKCIA KOMITATO :

Sekretario :

Jean-Paul Guillot, 21, rue des Aubépines
86 - Poitiers

Komitatanoj :

Pierre Babin
Pierre Chevalier
Simone Guillot

La represo de artikolo el nia revuo estas permesita post interkonsento, kun la redakcio. Oni bonvolu ĉiam citi la nomon « Kulturaj Kajeroj » kaj sendi ekzempleron de la revuo aŭ gazeto en kiu aperis la koncerna represaĵo.

ENHAVO

El Grésillon

Revene el Telemio J.G. Fowler

Esperanto tra la mondo A. Frangeul

Bulgario

La homoj de la danaj torfejoj

Grésillon 20 jara J.-L. Kristos

Libertempado en la jaro 2050 trad. Antoni Madej

Japanaj rakontoj trad. Kozi Sato

Ŝerceto (de A. Ĉekov) trad. Pepe

Nia konkurso P. Chevalier

KULTURAJ KAJEROJ
ne similas, ne similos al aliaj Revuoj.

KULTURAJ KAJEROJ
spegulos la vivon de nia Esperantista Kulturdomo.

KULTURAJ KAJEROJ
publikigos la plej gravajn prelegojn aŭditajn de niaj vizitintoj, kaj artikolojn de diverslandaj eminentaj esperantistoj.

KULTURAJ KAJEROJ
respondos al gramatikaj demandoj.

KULTURAJ KAJEROJ
prezentos konkursojn, kaj diversajn amuzaĵojn.

Ni deziras ke « **Kulturaj Kajeroj** » plaĉu al vi. Sendu viajn sugestojn, kaj kritikojn

El Grésillon

Ĉe la fino de jaro, kiu vidis tiel grandan nombron da vizitantoj, kiel lastan jaron, nia konsilio konstatis, ke kvankam la enspezoj kreskis, la elspezoj ankoraŭ pli altiĝis pro la akcelita kresko de la prezoj. Pro tio la profito ne estas tiel granda, kiel antaŭvidite. La plibonigo de la instalaĵoj estos ebla, ni esperas, dank'al la donacoj de gesamideanoj kaj ankaŭ dank'al la nombro da akcioj ĉijare akiritaj.

Niaj aktivaĵoj en 1973 multe similos tiujn de 1972 pro tio, ke ĉiuj aranĝoj renkontis sukceson. Krom la Paskaj du semajnoj okazos, dum la somero, la kvar kutimaj periodoj. Dum la unua trisemajna kurs-periodo malfermita al ĉiuj okazos renkontiĝo de Fervojistoj (unua semajno) kaj seminario organizita de la Esperanto-komisiono de la instruista movado « Moderna Lernejo » (dua kaj tria semajnoj). Poste la Internaciaj Semajnoj proponos diverstemajn prelegojn, diskutojn kaj ekskursojn. En aŭgusto, dum tri semajnoj la restadantoj povos ĉeesti kursojn diversgradajn. Simila programo estas planita por la lasta periodo dusemajna. Ni esperas, ke tiu programo ankaŭ ĉijare plaĉos kaj allogos multajn geamikojn. Ĝi estos presita fine de decembro. Tuj petu ĝin kaj ne forgesu, ke ĉiujare ni devas rifuzi kelkajn aliĝojn aŭ ne doni al la petantoj la deziratan loĝejon. Do aliĝu frue.

-:- REVENE EL TELEMIO -:-

Mi ĵus revenis hejmen post tri semajnoj en la kastelo Grésillon en Anĵuo. La staĝantoj tie estis ĉefe francaj, sed mi amike rilatis ankaŭ kun nederlandanoj, germanoj, usonanoj, hungaroj... estis eĉ vizitanto ĉina, kaj du el japanujo ĵus foriris kiam mi alvenis ! Ni spertis neniun problemon pri lingvoj ! La kastelo, en siaj 17 hektaroj da parko, estas la propraĵo de grupo de francaj esperantistoj, kiu malfermas ĝin kiel gastejon, sur bazo ne profitgajna. Ili restigas je nivelo tre modesta la kostoj de restado tie. Mi povis ĝoje partopreni promenojn, dancfestojn, prezentadojn de filmoj, koncertojn kaj prelegojn (mi mem parolis pri Londono). Krom tio mi povis elekti inter kursoj pri korbarto, emajlado, librobindado kaj, kompreneble, la internacia lingvo... ĉiuj senkostaj — grava konsideraĵo por pensiulo, kiu deziras plej efike profiti sian tempon kaj siajn okazojn de instruiĝo, vojaĝado. Sed, sen dubo ia ajn, la plej granda ĝojo estis esti kun homoj el diversaj nacioj, kaj povi libere interŝanĝi siajn ideojn unu kun alia, ne kiel germano kun brito, aŭ kiel franco kun polo, sed kiel homo kun homo. La atmosfero de reciproka helpemo donis al mi la senton, ke finfine mi sukcesis trovi la legendan abatejon de Thélème.

J.-G. FOWLER.

Esperanto tra la Mondo ★

ĈIRKAŬ LA UNIVERSALA KONGRESO 1973

— La prezidento de Jugoslavio, Josip Broz Tito kiu estos la honora protektanto de la kongreso en Beograd (28-7 - 4-8) iam lernis Esperanton kaj ĉiam simpatias al ĝia movado.

— La oficiala postkongreso de la « 58-a » okazos en Ateno, Grekujo (5-12.8).

— La junulara kongreso (TEJO), okazos en Sarajevo, Jugoslavio, de la 21-a ĝis la 27-a de Julio.

— Faldfolio en Esperanto pri Beograd povas, eĉ kvantete, esti ricevita de la jena adreso (senpage) : 58-a U.K. de Esperanto, Terazije 42, YU-11000, Beograd.

— Sespaĝa grandformata kaj ilustrita bulteno de la kongreso povas, ankaŭ kvantete, esti petata de la landaj Esperanto-asocioj de U.E.A.

— Aperis bela glumarko vendita de la libro-servoj (o,50 gld por dekmarka folio).

— La infana kongreseto estos rezervita al infanoj de 6 ĝis 13 jaroj kies lingvoscio ebligos sekvi la specialan programon.

EŬROPA KONGRESO

— Dum pentekosto 1973 (8-11.6), okazos en Luksemburgo, komuna eŭropa kongreso por la kvar landoj : Francujo, Germanujo, Belgujo, Nederlando.

Krom la naciaj asocioj, sendas informojn : S-ro R. Hoegener, 4, rue des Charbons, Esch-sur-Alzette, Luksemburgo.

— Markola kongreso 1973 : en Folkestono, 28-a de aprilo - 1-a de Majo.

POR LA SKIISTOJ

En Februaro 1973 okazos 2 aranĝaĵoj por skiistoj en Werfenweng (Salzburg, Aŭstrujo) (10-a - 17-a kaj 17-a - 24-a de Februaro).

Rilati kun S-ro Joh. Geroldinger, Wienestr. 2c, A-4020 Linz.

KORESPONDA SERVO DE LA JUNULARA ASOCIO T.E.J.O.

Nova adreso : Jadwiga Greger, ul. Kujawska 24, Sopot, Pollando.

2 GRAVAJ LERNILOJ EN USONO POR ANGLALINGVANOJ

Du gravaj eldonejoj ĵus preparis Esperanto-kursojn por angla-lingvaj komencantoj. « A first Course in Esperanto » (Unua Kurso de Esperanto), eldonita de Channing Bete, Greenfield, Mass., 1972 kaj verkita de William Auld, estas dekleciona, 32 p., broŝurita kurso kiu taŭgas por klasoj aŭ mem studo. La aŭtoro, William Auld, skota literatoro kaj edukisto, mem aplikis la novan kurson en San Francisco State College en Usono. Ses kasetsonbendoj, sur kiuj S-ro Alud prononcas la ilustran materialon de ĉiu leciono, estas ankaŭ haveblaj.

La plej ampleksa surdiska Esperanto-kurso iam produktita estas nun pretigata de alia usona eldonejo, Parents'Magazine, en Novjorko. La kurso celas instrui bazan Esperanton al anglalingvanoj per 14 lecionoj sur 14 longedaŭraj diskoj kaj per akompanaj lernolibro kaj vortaro. La parolantoj estas D-ro Humphrey Tonkin de la universitato de Pennsylvania, lia edzino, kaj Prof.-o Jonathan Pool de la universitato de Novjorko en Stony Brook. Laŭ la opinio de la fama lingvisto Mario Pei, la lecionoj estas « bone planitaj, bele parolitaj kaj pedagogie altkvalitaj ».

Channing Bete kaj Parents'Magazine ne estas la solaj usonaj eldonejoj kiuj lastatempe aperigis Esperanto-librojn. Bela traduko de la porinfana klasikaĵo Winnie-la-Pu fare de Ralph Lewin kaj Ivy Kellerman Reed aperis en eldono de E.P. Dutton. Krome ni povas mencii la aperon en Usono de du bonegaj propagandaj broŝuroj : « The ABC's of Esperanto » kaj « About Esperanto ».

NOVA INTERESO PRI LA INTERNACIA LINGVO EN KOLOMBIO

Bogota, Kolombio. — Intereso pri la internacia lingvo rapide kreskas en ĉi-tiu sudamerika lando, laŭ raportoj de la Kolombia Esperanto-Ligo. Kaj la jurnalo « El Colombiano » de Medellin kaj « El spectador » de Bogota aperigis plurajn artikolojn tre favorajn al la Internacia Lingvo, kaj la Esperanto-Dialoga Asocio de Medellin lastatempe dissendis, helpe de loka firmao, pli ol 5 000 ekzemplerojn de faldfolio pri la lingvo.

Ne nur informa ced ankaŭ eduka agado rapide kreskas. En Medellin okazas aŭ okazis koresponda kurso, kurso en la « Universidad Pontificia Bolivariana », kie pli ol 500 interesitoj anoncis sin por la kurso, kaj kursoj ĉe pluraj aliaj altlernejoj ; en Bucamaranga kurso kun pli ol 200 lernantoj okazas en la privata « Winston Salem Language Center ». Baldaŭ okazos kurso ankaŭ en la « Universidad Nacional » en Bogota. Ĉi-tiu ekbolo de intereso staras malantaŭ la decido okazigi en Medellin la unuan landan Esperanto-kongreson en Kolombio.

NOVAJ ELDONAĴOJ

— « ABZ de Amo », de Inge kaj Sten Hegeler. El la dana tradukis Schleicher kaj Weide. Enciklopedio pri la seksa vivo... por maturaj homoj.

— « Esperanta legolibro » de Migliorini. Vere tre bona legolibro por progresantoj... kaj aliaj, kun ekzemploj de la verkaĵoj de niaj plej ŝatataj verkistoj. Tiu reeldonaĵo estas jam la kvina eldono !

— « Doktoro kaj lingvo Esperanto » de Adolf Holzhaus ; Rezulto de plurjara esplorado pri la vivo de Zamenhof kaj komenco de nia movado.

— « Hilelismo ». Fotopreso de malmulte konata broŝuro de Zamenhof.

EN RADIO KAJ TELEVIDO SLOVAKAJ

Post la pasintjara kurso por komencantoj, ekde la 5-a de Septembro, la slovaka radio elsendis kurson por progresantoj. La kurso konsistas el 24 lecionoj.

La slovaka televido elsendas ankaŭ nun kurson en 17 lecionoj : Ĉiu leciono daŭras 30 minutojn kaj estas elsendata dufoje semajne. Post la nederlanda, tio estas la 2-a televida kurso en Eŭropo.

OFICIALAJ SUBVENCIOJ

La dana servo por kulturo kaj aliaj oficialaj servoj atribuis, en du jaroj, 80 000 danajn kronojn por eksterlandaj teatraj kaj marionetaj trupoj esperante parolantaj.

BULGARIO

Nia elirpunkto estos Varna, ĉe bordo de Nigra Maro.


Laŭlonge de la vojoj la paneloj estos cirilmaniere skribitaj. En la komenco de Mezepoko, Fratoj Cirilo kaj Metodo, bulgaraj monaĥoj, ĝin kreis, devene de la greka alfabeto. Deĉifri la leterojn estos ludo kaj baldaŭ vi mem povos kompreni. Cetere, afable la Bulgaroj helpos al vi.

Ni direktiĝas al Tirnovo ; ĝis Choumen la pejzaĝo dolĉe valetas kun, sur la malproksima horizonto, la altaj Balkan-ĉenoj. Tute dediĉita al kulturoj tiu regiono estas tiu de la grandaj kooperativaj farmoj. Kompreneble oni momenton haltas en la « ŝtonigita arbaro ». Strangaj rokoj tie staras, ĝis nun en plena dezerto ; sed hodiaŭ, ĝis nevidebleco radias la lumeca flavo de la sunfloroj.

Kaj ni, maldekstren, veturas. Post unu-hora vojaĝo ni troviĝos fronte al la alta klifo de Mandara. Sur ĝi, ĉe alto neatingebla, estis gravurita, ŝajne en la VIII-a jarcento, la « Rajdanto » ; ĝi simbolas unu el la Traciaj Suverenoj de la unua Bulgara Ŝtato.

Choumen, grava urba Centro, estas deviga etapo. Sur la stratoj multaj virinoj ankoraŭ vualiĝas — estas otomana kutimo ; cetere en la 10 milionoj da loĝantoj, Unu miliono estas Turkoj ; kelkaj moskeoj estas viziteblaj de la turistoj.

Trans Choumen, iom post iom, la dekoro, ŝanĝiĝas. Laŭ sinua vojo, borderita de belegaj arboj, oni supreniras sur la monto. Kvankam florumitaj,



la vilaĝoj estas tristaj kun siaj domoj el gisaj brikoj kaj siaj vojoj el batita tero. Supre, malfacila estas la vojirado laŭlonge de la monto-kresto. Sed kiaj belegaj vidaĵoj !

Fine, oni atingas Tirnovon ! Pli bone estas grimpi sur unu el la ĉirkaŭantaj montetoj. Kia bela spektaklo !

Tirnovo estas kvazaŭ bulgara Toledo. La profunda ravino de Yantra ĉirkaŭfermas la urbon kaj kreas ĉi tie unu el la plej belaj pejzaĝoj de Eŭropo. Fronte al sudo, la domoj farbitaj je okro, rozkoloro kaj bluo, tegmentitaj je tegoloj, interimplikiĝas kaj alkroĉiĝas sur la deklivo ĝis kruta promontoro superstarita de la citadelo. Ne eblas rezisti al tiu plezuro : laŭiri la suprenirantajn kaj zigzagajn stratetojn, kies domoj, vestitaj je vitfoliaro, kondukas nin ĝis tiu fortreso ; por la Reĝoj ĝi estis samtempe bastiono kaj palaco.

CHIPKA KAJ LA VALO DE LA ROZOJ

La strato nin kondukas pli malproksimen ĝis koro de la Roz-Valo. Survoje ni laŭiras profundan kaj sovaĝan gorĝon ; en ĝiaj kavernoj, antaŭ tre longa tempo sin ŝirmis la prahistoriaj homoj. En tiu izolita regiono staras Drjanovo-Monaĥejo, kiu gardas la alirejon al Grabovo, la industriema. Tute najbare jen la tre bela antikva vilaĝo Trjavna. Nepre, ĝin ni vizitu. Kaj ankaŭ tiun novan urbeton konstruitan de la Ŝtato, honore al la tradicia arkitekturo kaj regionaj metioj. Kruta estas la suprenirado ĝis Chipka-intermonto. Tie ĉi monumento memorigas, ke, en 1878, la caraj armeoj venkis la turkajn armeojn, kiuj jam de la XV-a jarcento superregis Bulgarion. Beleta ortodoksa preĝejo, kun oraj bulboj elvokas la oferon de la Liberantoj. Malsupre, tre malproksime, etendiĝas senlima florita ebenajo. En junio estas rozoj ; post julio, lavendo.

Karlovo estas modesta urbo. Tamen ĝi gravas en Bulgario-Historio. Tie vivis kaj sin kaŝis Vassil Levski, la Revolucio-instiganto. En Sopot naskiĝis Ivan Vazov, kies romano « Sub la jugo » estis tradukita en 23 lingvojn. Muzeoj, modestaj tiutempaj domoj, memorigas ilian grandan oferemon al nacia idealo.

Karlovo havas propran industrion : distilado de la roz-esenco. En junio, je tagiĝo, ĝis nevidebleco, junulinoj kun blanka korsaĝo brodita je verdo kaj ruĝo kolektas la florojn. Je regulaj horoj, kun ilo sur ŝultro, fulardo ĉirkaŭ la haroj, nudpiedaj, ili anservice laŭsekvas la padojn ; kaj refrenoj, el malproksimaj tempoj, ilin akompanas.

Najbare jen Koprivchitsa : ĝi situas je 1 000-metra altitudo, meze de arbaroj. Ŝajnas, ke oni revas : sur la montetaj deklivoj etaĝiĝas malaltaj domoj kun tegmentoj similaj je la turkaj « 4-akvaj » ; la tegoloj ne plu bone apudiĝas kaj ĉiu kruta kameno estas kronita de cikonio-nesto. Sur la interplektiĝantaj stratetoj defluiletoj, serpentumante, enprofundiĝas en la tero ; azenoj trotetas kaj ilin akompanante, virinoj ŝpinas.

Grandaj fasadoj, kun korbeloj, farbitaj je freŝa

ultramaro, okro, hela karmino, laŭ la XIX-a baroka bulgara stilo, kaŝas la areon, kie pikpikas la kortbirdoj. Oni tien eniras per larĝaj lignaj portaloj.

SOFIA : Severa ŝajnas tiu ĉefurbo

Modernaj kvartaloj ĉirkaŭas Lenin-Placon. Kolosaj konstruoj, grandaj parkoj abunde florumitaj. Sur la benkoj, premitaj unu ĉe la alia, la Bulgaroj longe sidadas kaj babilas. Sed ni serĉu la malnovajn kvartalojn ; ĉirkaŭ St-Georgo-Baziliko prifosoj elterigis ruinojn el la antikva urbo. Jen la moskeo, kiun bomboj domaĝis. Laŭirante la subterajn pasejojn konstruitajn sub la ŝoseoj, ni preteriras monumentojn de la Mezepoka urbo.

Antaŭ la maŭzoleo de Georgo Dimitrov ni unuminuton silentu. Ni iros ĝis la Katedralo Aleksandro Nevski : ĝi estas arkitektura juvelo, konstruita komence de nia jarcento ; ĝiaj oraj kupoloj brilas sub suno ; ĝia kripto entenas ikonojn rimarkindajn pro siaj riĉaj koloroj ; kelkaj el ili datumas je bizanca epoko.

Vitoŝa-monto, kolosa maso, superstaras la ĉefurbon ; ĉe ĝia piedo, jen la malgranda romanika preĝejo de Bojana : ĝi estas ĉefverko kaj ĝiaj ikonoj indas ke ni haltu.

100-kilometrojn pli sude, lokita profunde en la valo, Rila-monaĥejo estas plej rimarkinda, ankoraŭ frekventita de la monaĥoj kun nigraj frokoj ; ĝia klostro, hodiaŭ muzeo enhavas la plej belajn ikonojn de Bulgario. Estas impona konstruaĵo ; ĝi pli kaj pli ampleksiĝis laŭlonge de la jaroj ; ĝi estis kreita en 865 de Ivan Rilski, anakoreto kiu decidis, kun kamaradoj, instaliĝi en tiu loko izolita sed tamen sufiĉe proksima de la vojo iranta de Ateno al Danuba Eŭropo. Dum la 5-jarcenta otomana superregado, dank'al la aparta privilegio, kiun ili ĝuis, la Rila-monaĥoj helpis la kulturan movadon, kiu kondukis al konceptaĵo de Bulgaria Nacio.

La teretaĝo, la unua etaĝo ŝirmis 300 religiulojn ; la pasantaj gastoj (ĝis 100) povis loĝi en la subtegmentejo. La virinoj tute ne estis akceptitaj. Hodiaŭ multnombraj venas la turistoj por admiri tiun Altan Lokon ; ĝia dekoracio estas freŝa ; la arkadoj, laŭ Kordova maniero, estas alterne el blanka kalka ŝtono kaj el nigra grejso. En la preĝejo, la muraj pentraĵoj, riĉekoloritaj, alportas al ni profundan senton : ĉi tie riĉiĝis laboro, enmemiĝo kaj ekstazo.

Tra la tabako-kampoj, tra la grandaj pinarbaroj de Borovetch, tra la verdanta kaoso de Rodopo-monto, ni atingas Tracio-ebenaĵon ege varmigitan, tute inunditan de suno. Kaj ni estas en Plovdiv : dua urbo de Bulgario, industria centro, famaj foiroj, deviga etapo sur la vojo al Istambul. Ne tre longe ni restos en la modernaj kvartaloj. Sed kiom ĉarma estas la malnova urbo ; ĝi premiĝas piede de tri montetoj. Plej agrable ni laŭiras la ombritajn stratetojn, kiuj plej kapriceme supreniras, preterpasante la domojn — aŭ dekstren, aŭ maldekstren — kaj ni haltas antaŭ rozkolora domo. Tie ĉi Lamartine loĝis dum kelkaj monatoj, kiam li revenis el sia vojaĝo en Oriento.

Ĉirkaŭe estas nur belaj loĝejoj, buntaj je vivaj koloroj, kun korbeloj ĉe fasadoj. En ĝardeno, jen etnografia muzeo plej riĉa je elvokaĵoj pri la tradicia, esence kampara, vivo de Bulgario. La arkeologia muzeo entenas vazojn, ritajn objektojn, orajn uzaĵojn ; ilin oni trovis en la antikvaj urboj kaj precipe en la trezorejoj najbaraj je Panagurichte kaj Valchetran, lokoj famaj en la VII-a kaj IV-a jarcentoj de nia erao.

Ni ne forgesu viziton al, sur Rodopo, la romantika monaĥejo de Bachovo (fondita en la IX-a jarcento) ; ĉi tie sovaĝa klostro, eta kapelo, ikonoj, freŝaj muraj pentraĵoj ĉarmas niajn okulojn ; kaj ankaŭ viziton al Pamporovo, monta stacio : el ĉi tie grandiozaj estas la vidaĵoj.

Por iri al Burgas ni trairos ebenaĵon apenaŭ ondan. Se ni havas ŝancon ni renkontos ŝafistojn, kun ĉapo el bestharoj, muzikante sur « Kaval'-o », kiuj kondukas ŝafarojn aŭ bubalarojn.

Eble ni vidos karavanojn de ciganoj vagantaj sur la stratoj (oni diras ke duono da miliono ili estas en Bulgario).

Stara-Zagova ... Sliven ... Burgas.

Ni estas ĉe marbordo. Jen la Nigra Maro, kiun la Antikvuloj nomis « La Malluma » ; ĝia smeraldoverdo estas intensa.

La grekoj nomis ĝin « Pontus Euximus » = « Reĝejo de la Ponto ». Antaŭ ol ripozi sur la belegaj plaĝoj de « Suno-Bordo » ni vizitos Sozopol, malnova ĉarma vilaĝo, kaj norde de Burgas, Nessebre.

Nessebre estas urbo malnova je 3.000 jaroj ; ĝi premiĝas sur insuleto, kiun mallarĝa istmo ligas al kontinento. Famaj estas la 30 preĝejoj antaŭlonge konstruigitaj, sur mallarĝa spaco, de la bizancaj altranguloj kaj de la bulgaraj bojaroj. La tempo ilin ruinigis, same kiel la malnovajn domojn el ligno. Sed nuntempe kelkaj estas restarigitaj.

Pli norde jen « Or-Sabloj », la blonda plaĝo kelk-kilometrojn longa. Vastaj kaj komfortaj hoteloj atendas la turistojn sur la bulgariaj plaĝoj.

Se plaĉas al vi, vi povas iri ĝis, norde de Varna, la tropika arbaro, kiu superstaras la bordon de Nigra Maro. En ĝi kaŝiĝas la surroka monaĥejo de Aladja. La vegetaloj estas tiel diversspeciaj, la arbaroj tiel densaj en humida, tropika klimato, ke la Ŝtato ĉi tie kreis parkojn kaj rezervejojn, kies surfaco lokas Bulgarion ĉe la unuarango en Eŭropo : ursoj, aproj, sovaĝkaproj, ĉi tie libere vivas ; milionoj da birdoj, kies kelkaj specioj forlasis okcidentEŭropon gajigas la arbarojn per siaj kantoj.

La Natur-Amikoj estos plej feliĉaj.

Vesperiĝas. Vi ĵus alvenis en restoracion, malfermitan sur kamparo ; ĉe la plafono, hirundo-nestoj estas alkroĉitaj. En leĝera flugil-bruo la gepatroj iras kaj reiras por alporti nutraĵon al idoj neniam satigitaj.

Dume, vi gustumas la naciajn manĝojn : la antaŭmanĝoj entenas kazeon, salaton, tomatojn ; la fiŝoj estas malmultaj ; la viandoj estas rostitaj : ŝafo (kebab) kokido, « kavarma » ; jahurto (la plej bona estas el bubalino-lakto) ; la desertoj estas tre sukeritaj, kiel en ĉiuj orientaj landoj ; pano kun fromaĝo (banitza).

La vino estas bonkvalita sed la biero estas preferata. Apetitdone aŭ digestige, vi gustumos la pruno-brandon, forte alkoholigitan ; sed ĝin vi ne trinkos se vi devas konduki aŭtomobilon !

Dume la violonoj jam ploregas en la nokto.

La Homoj de la danaj torfejoj

Estis en la printempo de 1950. Du viroj ekstraktis torfon el la marĉoj de Tollund (Danlando). Ili malkovris viran korpon, tiel bone konservita, ke ili pensis pri ĵusa murdo ; ili tuj avertis policon.

La korpo troviĝis je 50 metroj de la marĉo-bordo kaj sub 2,50 m. de torfo ; en dormo-pozicio kun la kapo al oriento, la piedoj al okcidento ; lia vizaĝo rigardis al sudo. Sur la kapo li havis pintan kapuĉon el ledo, ligitan sub mentono ; lia talio estis ĉirkaŭita de zono, ankaŭ el ledo ; krom tiuj du vesto-artikloj la viro estis nuda ; liaj haroj estis mallonge tranĉitaj kaj lia vizaĝo razita, krom nur kelkaj haroj sur la mentono kaj la supera lipo. Leda rimeno, el du kuntorditaj laĉoj, formis, streĉe stringitaj ĉirkaŭ lia kolo, ŝovnodon, kies ekstremaĵo pendis sur liaj ŝultroj kaj kolo.

Scienca studo permesis konkludi, ke la viro estis entombigita en la marĉon antaŭ 2000 jaroj ! La kapo de tiu viro en Tollund estis eksterordinare bone konservita (multe pli bone ol ĉiuj kapoj de antikvaj homoj, ĝis nun trovitaj en la mondo). Tiu vizaĝo, kun la okuloj pace fermitaj, kun la lipoj dolĉe kunigitaj memorigas al ni la vortojn de la sumera « Gilgamesh »-epopeo verkita antaŭ 4 000 jaroj : « Ho ! kiom multe similas la mortinto kaj la dormanto ! »

Surloke oni fabrikis keston el tabuloj ĉirkaŭ la Tollund-viro.

Tiamaniere estis eble lin transporti, sen ŝanĝi lian pozicion, ĝis la Nacia Muzeo en Kopenhago.

Ĉi tie oni lin science ekzamenis kaj aplikis al li konservado-traktadon. La jurkuracistoj, lin ekzamenis kaj post radiografiadoj, konkludis, ke la viro estis ne strangolita sed pendumita pere de la rimeno, kiu ĉirkaŭis lian kolon. Ili ankaŭ konstatis, ke la kranio havis neniun lezon, kaj ke la cerbo estis perfekte konservita. Post ekzameno de la saĝo-dentoj ili opiniis ke la viro estis 20-jara, kiam la morto prenis lin. La internaj organoj : koro, pulmoj, hepato ankoraŭ ĉeestis en la korpo ; ankaŭ la stomako kaj la dika kaj mildika intestoj, kiuj ankoraŭ entenis la lastan manĝon de la viktimo : ĝi konsistis el hordeo-kaĉo, de lino-kaj-fagopiro-grajnoj kaj de kelkaj sovaĝaj plantoj ; sed oni trovis neniun spuron de viando aŭ fiŝo. La manĝo estis konsumita inter 12 kaj 24 horoj antaŭ la morto.

Post tiuj observadoj oni plej zorge traktis la kapon por ĝin bonstate konservadi. Oni povas ĝin vidi en la Muzeo de Silkeborg, ne malproksime de Tollund. Tiu malhelkolora vizaĝo suprizas nin kaj fascinas nian rigardon. Eksterordinara vid-al-vido kun viro 2 000 jara !

Iom pli poste, en printempo 1952 alia korpo estis entombigita el la marĉo Nebelgaard, apud Grauballe (20 km. de Tollund). La viro de Grauballe subite aperis el la torfejo, kiun oni fosis : kapo kaj ŝultroj elmergiĝis el amaso de torfo. Oni tuj transportis lin en la Prahistorio-Muzeon en Aarhus. Tiu ĉi viro estis tute nuda, sen ia ajn objekto. Analizo permesis trovi restaĵojn de plantoj kaj poleno. 14-karbono precizigis la daton de lia vivo : en la 3-a aŭ 4-a jarcento post Kristo. Nenia dubo pri lia morto : lia kapo estis tranĉita de unu orelo al la alia. Radiografioj kaj studo de liaj dentoj kaj ostaj histoj igis pensi, ke li estis iom pli ol 30-jara. La viro de Grauballe estis perfekte konservita (kvankam iom platigita pro la pezo de la dika torfo-tavolo).

Liaj haroj estis 15 cm.-longaj sed la barbo havis nur 1 mm. La cerbo estis tiel bone konservita, ke oni povis vidi ĝiajn volvaĵojn. Lia lasta manĝo konsistis, ankaŭ ĝi, en kaĉo el cerealoj kaj grajnoj. Neniuj fruktoj aŭ beroj, neniuj printempaj aŭ someraj plantoj ; oni povas supozi, ke la 2 viroj mortis dum vintro aŭ komence de printempo. Oni opiniis, ke ili estis oferbuĉitaj okaze de la grandaj festoj dediĉitaj jen al vintra solstico, jen al printempo-rito. Manoj kaj piedoj estis tiel bonstataj, ke estis eble preni iliajn fingro-premaĵojn : certe ili estas la plej antikvaj, kiujn oni konas.

Dum la 1 500 jaroj, kiujn ĝi pasigis en la marĉo la korpo ricevis naturan tanadon, kiu ĝin protektis ĝis niaj tagoj. Por ke ĝi plue sendifekte konserviĝu oni, dum unu jaro praktikis tanadon pere de kverko-ŝelo. Nune, dank'al antaŭa muldaĵo, ĝi ripozas sampozicie kiel antaŭe, en Mosergaard-Muzeo (apud Aarhus).

La marĉoj de Nord-Orienta Eŭropo (Danlando, Nord-Orienta Germanujo, Norvegujo, Svedujo) kaj eĉ de Centra Eŭropo, liveris proksimume 700 korpojn (viroj, virinoj, infanoj). Estas la acido entenata en tiuj torfejoj, tre malriĉaj je oksigeno, kiu tanadis haŭton kaj harojn. kaj perfekte konservadis tiujn korpojn. La plej multo el la unuaj korpoj malkovritaj forpolviĝis pro efiko de la aero-oksigeno, kiun en la komence, oni ne sciis kontraŭstari. Tamen oni provis elsekigon. Tiamaniere oni gardis korpon de virino, kiu nune ripozas en la kripto de Sto Nikolao de Vejle (Jullando) en kverka ĉerko, donacita de Frederiko la VI-a. Oni ĝin trovis en la marĉo. Haraldskjaer en 1837 ; longtempe oni pensis, ke ĝi estis la korpo de Reĝino Gunhilde de Norvegujo, kiun, antaŭ 900 jaroj, oni hontinde dronigis en marĉon de tiu regiono. Sed sciencaj kontroloj precizigis, ke tiu virino vivis en Fero-Tempaĝo t.e. 1 000 jarojn antaŭ Gunhilde.

En 1780 oni estis trovinta (en torfejo proksima je monto Drumenheragh, en Irlando) elegantan virinon ; ŝi estis vestita je leĝera ŝtofo verda kaj ruĝa kaj envolvita en pelerino ornamita je teksitaj personoj ; ŝi ripozis sur 3 lanaj kovriloj.

En la marĉo Borremose (Jutlando) proksime de

urbo-ruinaĵoj ,datumitaj de unu jarcento antaŭ Kristo oni trovis du korpojn ankaŭ bone konservitaj. La viro, klinita, havis ĉirkaŭ sia kolo rafio-ŝnuron kun ŝovnodo, el 3 plektitaj vergetoj, kies ekstremaĵoj estis lerte plifortigitaj per led-rimenoj : lia nuko estis rompita, sendube per strangolado aŭ pendumado ; li estis nuda, sed ĉe liaj piedoj estis 2 pelerinoj, faritaj el kunkudritaj ŝaf-feloj, jen helaj, jen malhelaj.

La alia korpo estis tiu de virino, kiu ripozis sur tavolo da betula-ŝelo ; ŝia torso estis nuda sed kovrilo protektis ŝian ventron.

Sur insuleto de tiu sama marĉo oni eltorfigis vilaĝon el 20 domoj, laŭlonge konstruitaj (23 m. longa, 7 m. larĝa estis la plej granda) ; ili tute similis la malgrandajn farmojn de Jutlando, konstruitaj komence de krista erao kaj estis loĝejoj komunaj al homoj kaj bestoj. Tiuj domoj divers-dimensiaj estis arigitaj ambaŭflanke de pavimita strato ; la muroj estis el terbuloj kaj la tegmentoj estis kovritaj per pajlo aŭ eriko ; en vintro la homoj ĉirkaŭis centran fajrejon kaj la bestoj okupis stalfakojn.



En Selsvig (Jutlando) la Gottorp-Kastelo ŝirmas junan virinon kaj maljunan viron, kiuj longe dormis en torfejo. Tie ĉi estas ankaŭ kapo de viro, kiu portas strangan ĉapon ; liaj ruĝaĉaj haroj (origine blondaj) formas hartuberon sur la dekstra flanko de la kapo. Tacite en la libro, kiun li skribis pri la Germanoj (Suevestribo) raportas pri sama ĉapo kaj sama hartubero ; ankaŭ la romaniaj skulptaĵoj montras ĝermanojn kun tiaj hartuberoj. Tacite skribis ankaŭ pri la homaj oferaĵoj ; ili estis aŭ puno de krimo aŭ rito dediĉita al printempokulto. Pri la germana justico Tacite precizigas ke la akuzitoj estis submetitaj al Tribunalo de kiu oni povis peti ĉefan punon. Renegatoj kaj perfiduloj estis pendumitaj al arbo ; malkuraĝuloj kaj koruptitoj estis mergitaj en ŝlimon aŭ torfejon.

Pri kulto ĉiujare okazis rita dramo elvokanta la naskiĝantajn fortojn de la Naturo, la ĝermadon de la tritikoj, la fekundecon de la homoj kaj de la dombestoj. Tacite rakontas, ke sur insulo de la oceano estis arbaro, en kiun neniam viro eniris. Tien ĉi venis la Diino « Nerthus », la Patrino-Tero, kun la Pastro ŝi instaliĝis en ĉaro tirata de bovoj. Ili trairis la kamparon, disverŝante sur ĝin vivon kaj fekundecon.

Post la ceremonio Diino kaj ĉaro estis lavitaj, en sekretaj lagoj, de servistoj, kiuj poste estis dronigitaj en marĉon. Ankoraŭ en la komenco de krista erao, tia diino estis kultita en la Nordaj Landoj. La tiutempaj statuoj el bronzo montras ŝin nuda, kun kelkaj ringoj ĉirkaŭ la kolo kaj ĉe la oreloj.

Jam sur la neolitikaj vazoj estas ŝiaj rigardoj, kiuj fikse rigardis nin kaj estas ŝia simbolo, kiun oni trovas sur la tiamaj pendjuveloj el ardezo kaj sur la amuletoj.

Komence de la Fero Tempaĝo ŝi estas la Plej Alta Diaĵo por la homoj de la marĉoj ; sur broŝoj el bronzo ili stilizis ŝin, de kiu ili atendis rikoltojn kaj fekundecon.

En marĉo proksima je Gundestrup, oni trovis belegan vazon el martelita arĝento ; sur la ekstera vando Dioj kaj Diinoj portas siajn simbolojn ; la interna vando montras ritajn scenojn : la diinoj ĉirkaŭitaj je fabelaj bestoj ĉeestas homajn oferadojn. Sendube ĝi estas militakiro ; oni pensas, ke ĝi estis ellaborita en Sudorienta Eŭropo, alportita en Danlandon ; ĝi iĝis oferaĵo kaj estis metita en marĉon.

Ofte apud la korpoj, en malgrandaj elkavaĵoj similaj je marmitoj oni malkrovis multajn kolierojn kaj braceletojn metitajn ĉi tien ofere al la diino.

Oni povas supozi, ke la viro de Tollund kaj la aliaj, kiuj ŝajne ankoraŭ dormas, iĝis, okaze de la Printempo-Festo, parulo de la Diino kaj post la amorado ili estis oferbuĉitaj al ŝi.

Laŭ Peter V. GLOB,
Arkeologo, internacie famekonata.
Direktoro de la Nacia Muzeo en Kopenhago.

GRESILLON 20 JARA

Jen la lasta parto de nia ĝenerala trarigardo de 20 jaroj da vivado de la Esperantista Kulturdomo. Fakte, paroli pri historio neniam sufiĉas se oni ne uzas la pasintajn eventojn al plibonigo kaj al evoluo de la afero por la estonto. Tial ni ĉi-malsupre donas la parolon al nova Gresillon-ano, kiu plie estas junulo. La intereso de junuloj al Gresillon estas tute simple garantio ke tiu mirinda kreaĵo ne perdiĝos. La nunaj respondeculoj estas tiel kuraĝigitaj, same kiel Micard estis kuraĝigita de la unuaj Gresillon-anoj.

Nuntempa vivo en Grezijono

Kion ne-ordinaran skribi pri Grezijono ? Kiel persone skribi ? Certe, ĉiu Grezijonano havas similajn ideojn pri nia Domo kaj mi ne esperas alporti al vi ion novan, eĉ kiel junulo. Post restado en Grezijono, oni konservas homan senton, kiun ĉiu, plimalpli, sentas. Mi povas skribi nur pri komuna sento.

I. — ANEKDOTO

1. Rakonto. — Nun, post alia restado, mi unualoke memoras pri iu adiaŭa vespero post du semajnoj da agrablegaj ferioj. Tiun-ĉi vesperon, kiel kutime, ni ronde sidis por babiladi post la organizita vespero ; sed, malgraŭ kelkaj ĉampan-boteloj, ne ĉeestis ĝojo. Kelkaj rakontis historietojn sed, post rido (ĉar estis bonegaj historietoj), la etoso malgaja revenis. Neniu ploris ; ne estis scenejo de teatro, sed, oni sentis, ke ĉiuj estis emociitaj, ke « io » inter ni estis malaperanta. Fakte, ni revidos unu la alian aŭ en Grezijono aŭ en kongreso kaj ni interŝanĝis adresojn, sed tamen, « io » inter ni estis malaperanta.

2. Ties leciono. — Kion signifas tio ? Nur tion, ke dum nur du semajnoj, homoj interkonatiĝis, frateciĝis kaj ekamis unu la alian ; ĉu ekzistas Unu tendumejo tra la tuta mondo, kie tio okazis jam unufoje ? En Grezijono, ĉiujare okazas la miraklo. Fakte, estas miraklo. Kiam oni vizitas Grezijonon unuafoje, oni ne pripensas pri tio. Apenaŭ oni konscias. Sed la duan fojon, evidente estas kaj de tiu momento, oni sin demandas antaŭ ĉiu ferio : « Ĉu denove okazos la miraklo ? » Al mi, dufoje okazis kaj jam mi demandas min pri la venonta fojo.

II. — ANALIZO

1. Grezijona mensstato. — Vivi tiun miraklon estas neforgeseble. Konscii pri ĝi estas pli profunde. Klarigi ĝin estas malfacile. Kompreneble, oni devas pensi pri la nekutima mensstato de la gepartoprenantoj. Dum ferioj oni forgesas siajn zorgojn ; krome, en Grezijono, oni estas kiel novulo tute scivolema, kiel jam-grezijonano serĉanta kontakton (pri zorgoj, mi ne parolas pri la gerespondeculoj, kompreneble). La unua elemento de la miraklo estas tiu emeco al interŝanĝo, al kontakto. Se vi jam vizitis Grezijonon, pensu pri tiu fakto, ke gepartoprenantoj facile ekdiskutas eĉ babiladas pri si mem nature. Sed, kiel klarigi, kiel kompreni tiun mensstaton ? La tempo de la ferio ne sufiĉa klarigo estas, ĉu ne ; pensu pri la etoso en ordinara tendumejo aŭ hotelo ; ĉu diskutemaj ĉiuj feriantoj ? Ili ĝenerale zorgas pli siajn distraĵojn ol siajn najbarojn ; fakte, ili konservas dum ferioj la kutimojn de la urba vivo moderna, dum kiu oni ne konas sian najbaron.

2. Graveco de la organizo. — En Grezijono, estas tute alia afero. Ĉiu deziras forgesi zorgojn, ŝanĝi kutimojn, trovi ion alian kaj pro tio serĉas kontakton ; ankaŭ en ordinara vivo oni serĉas kontakton sed la etoso ne faciligas tion. Sed, Grezijona etoso estas nekutima etoso. Malgraŭ la multnombraj opinioj ne estas senorda afero, ĉar gerespondeculoj diskrete prizorgas. Jen, eble, la unua klarigo : tiu miksaĵo de libereco kaj de organizo ; tiu libereco organizita. Unuflanke, nepra estas libereco ; tiel, ĉiu elektas la manieron pasigi ĉiun tagon kaj sentante sin libera, li-ŝi facile ekbabilas. Aliflanke, se, dum ordinaraj ferioj oni povas forgesi kutimajn zorgojn, tamen oni devas zorgi pri la manĝoj (se tendumas) la distraĵoj, la vojoj (se turismumas). Sed, en Grezijono tio estas zorgita de gerespondeculoj, kiuj, krome, taŭge zorgas pri komunaj aktivaĵoj. Komunaj ; oni ĝuas neforgeseblan etoson nur se oni partoprenas la komunecon ; tiu etoso dependas de la gepartoprenantoj mem. Ne ekzistas en Grezijono tute organizitaj ferioj kiel en iaj ferioklubo j. Feliĉe ! Dependas de ni ĉiuj, ke Grezijono restas Grezijono.

3. Rezultato : aparta etoso. — Tiel, ni ne misuzas nian liberecon, sed ni profitas la okazon por interesiĝi pri nekutimaj problemoj, por interesiĝi pri la Aliaj. Esperantisto-ino estas

neordinara homo, kiu zorgas pri siaj najbaroj. Sed, dum kutima vivo, ĝi ne disponas sufiĉe da tempo, havas proprajn zorgojn ; Grezijono, dank'al sia organizita libereco, permesas al ĝi reale vivi ĝian idealon. Vi longtempe serĉos antaŭ ol trovi ferian lokon, kie oni povas tiel agrable pasigi tempon ; eĉ vi ne trovos. Eble, de tiuj faktoj devenas la aparta etoso de Grezijono ; tiu komuna, amika etoso en kiu ni tiel facile babilemas. Estas komuna kreado de la gepartoprenantoj kaj de la gerespondeculoj. Kaj ni ĉiuj devas klopodi por plidaŭrigi tiun etoson samtempe kaŭzo kaj konsekvenco de Grezijona mensstato.



Al la Esperanto - Domo

Dediĉita al JULIA ISBRUCKER kaj ANDREO ĈE
Kiuj aranĝis kaj dediĉis al « Grezijono »

I

Grezijono vokas ĉiujn
Tie Staras nia dom'
Tie lingvo Zamenhofa
Ligas homon kun la hom' !

REKANTAĴO


Grezijono,
en arbaro la kastel'
Por la anoj
de la bela verda stel !

II

Kune studas, babiladas,
Ĝuas, ridas, revas ni,
Tie ni diverslingvanoj
Sentas nin ĉe famili' !

III

Al la Esperanto-Domo !
Al la paca nia rond'
Por ke nia bela lingvo
Sonu tra la tuta mond'.



Teksto kaj muziko de Catherina Roskes Dirksen

Muzikaranĝo de Dina Appeldoorn

III. KONSEKVENCOJ

1. Graveco de Grezijono por Esperantismo. — Sed, fakte, kio estas Grezijona mensstato se ne estas esperantista mensstato ? Kio estas Grezijona etoso se ne estas konkretaĵo de Esperantismo ? Tiel, Grezijono donas eblecon konkretigi Esperantismon, vivi ĝin ; do estas vivanta parto de Esperantujo, kie ni konscias, ke Esperantismo ne estas vana vorto sed Realeco. Tio estas grava, ĉar, de tempo al tempo, eĉ la plej fervoraj dubas ; en Grezijono, ili interŝanĝas ideojn, trovas novan kuraĝon kaj foriras kun plenplena kapo de projektoj, denove firme fervoraj. Grezijono firmigas nian idealon ĉar konkretigas ĝin. Grezijono donas la eblecon al ni vivi ĝin Krom la kongresoj ; ĝi do havas gravecon en Esperantujo firmigante nian certecon pri la valoro de Esperanto. Tie ni fortigas nian idealon vivante ĝin ; tie ni lernas Pacon ĉar ni vivas Pacon.

2. Spirita riĉiĝo. — Krome, al Esperantisto kiel penspovanta estaĵo, Grezijono donas ion ne-takseblan donante la eblecon havi spiritan vivon. Fakte, tie ni ankaŭ ludas, ripozas, sed la ĉefa punkto, laŭ mi, estas nia spiritagado. Certe, ni ĉiuj estas esperantistoj, do havas idealon ; sed, dum kutima vivo, ne-ofte kaj nefacile ni povas doni tempon al ĝi. Male, en Grezijono, ni uzas la tutan restadon agante por idealo ĉu per lingva lernado, ĉu per prelegoj, ĉu per interamikiĝoj ; ni donas lokon pli vastan al idealo en nia vivo ; metante niajn fortoin al servo de idealo ni celas ne plu materian profiton sed spiritan riĉiĝon. Tiel, Grezijono permesas al ni valorigi nian Homan personecon ; donante la eblecon ekfuĝi la tro materian kutiman vivon, ĝi helpas al nia ekvilibra disvolviĝo kaj aldonas valoron al nia vivo. Ne nur sentecan sed ankaŭ spiritan riĉigon tie ni ricevas.

IV. KONKLUDO

Kiel konkludi nun ? Kion pensi pri Grezijono, nia Domo ? Mi ne forgesis la unuan karakteron de Grezijono kiel lingva lernejo ; sed, tio ne estas unika tra Esperantujo. Aliloke estas la esenca karaktero. Se Esperanto liberigas kaj permesas nin ne-pasive vivi, Grezijono ebligas nin ne-dubante vivi. Al Homo, kiel ano de homaro, pro sperto de vivanta Paco, Grezijono donas Esperon. Esperon pri Homo. Al tiu, kiu vizitas Grezijonon kun koro sincere pacema, ĝi aspektas kiel privilegia loko ekster tiu freneza mondo pro kiu, senĉese, oni dubas pri la saĝeco kaj la pacameco de Homo. « Al la mond' eterne militanta » Grezijono pruvas, ke ne stulte estas kredi je Homo ; nuntempe, ĝi estas simbolo de la potenco de idealo pacocelanta ; simbolo de Espero. Pensante pri Grezijono, mi ne povas akcepti la ideon komunan de la nepra fino baldaŭa de l'homaro ; mi nur povas sincere kredi je Homo.

Nun, je la fino de tiu pensado, Grezijono estas du vortoj por mi : Paco kaj Espero.

Jean-Luc KRISTOS.

Libertempado en la jaro 2050

Ni atendis jam preskaŭ dudek minutojn, sed la gvidanto ne venis.

— Ni veturu mem — mi proponis.

— Ekster la urbon sen gvidanto ? — oponis la ekskursantoj. — Kia profito el ĉi tia ekskurso !

— Nenion ni scios — anoncadis siajn dubojn la plimulto — sen gvidanto la ekskurso estas sensenca.

— Eble vi pravas — mi konsentis.

— Se vi konsentus pri miaj servoj — subite diris sinjoro Z. — mi povus iel anstataŭi la gvidanton. Ne estas mi fakulo, sed amatorece mi scias iom pri la ĉirkaŭaĵo, mi legis diversajn turismajn publikaĵojn.

— Bone, ni tre volonte aŭskultos — aŭdiĝis voĉoj. — Ni veturu, domaĝas la tempon.

La aŭtobuso ekveturis. Post horo da veturado ni ektroviĝis en la dezerta griza ebenaĵo. Ni forlasis la aŭtobuson. Iuj komencis promeni sur la polvoza tereno, aliaj eksidis sur faldseĝoj.

— Ni petas kelkajn vortojn da klarigo — postulis la ekskursantoj traktantaj turismon konscie kaj skrupule.

— Laŭ malnovaj dokumentoj — diris Z. — en la loko, kie ni nun estas troviĝis arbaro.

— Momenton, momenton ! — protestis kelkajn voĉojn — ni petas sen tiaj sciencaj esprimoj, prefere populare... La plimulto havas neniun antaŭpreparon !

— Prave ! — atestis aliaj. Parolu pli kompreneble... Kio estas arbaro ?

— Laŭ la naturologia terminaro de pasintaj jaroj — provis klarigi Z. — arbaro estas kolekto da arboj. Granda multo da arboj de diversaj specoj... Pinoj, fagoj, kverkoj, aceroj, betuloj...

— Kiel strangaj nomoj — diris iu kun nuanco de malkredo. — Multo da arboj... Mi vidis unu arbon en la muzeo de la naturmonumentoj, sed ĝi kreskis sub la vitra protektilo.

— Iam arboj kreskis en la libera aero — diris Z.

— Mi parolis, ke ni ne vojaĝu sen gvidanto — interrompis iu indignita sinjorino — la homo volus profiti iel el la ekskurso, sed ne aŭskulti ies elpensaĵojn.

— Sed la arboj vere kreskis en la libera aero — plu rezistis Z.

— Multaj ili estis, vi diras ? — provoke demandis iu junulo, apogita sur la karoserio de la aŭtobuso.

— Multaj, miloj, centoj da miloj — ripetadis Z. — Diversaj arbustoj juniperoj, kratagoj, musko...

— Kio estas tiu ĉi musko ? — demandis la junulo.

— Malata kreskaĵo, verda, konsistanta el malgrandaj branĉetoj. Musko distingiĝis per moleco...

— Do estus agrable kuŝiĝi sur ĝi kaj ripozi dum ekskurso ekster la urbo — ŝercis la juna homo.

— Kiu scias, eble tio estus granda plezuro — konstatis Z. — hodiaŭ en la jaro 2050, oni ne povas tion plene konstati.

— Parolu plu — instigis lin la sinjoro sidanta sur la faldseĝo — ni povas aŭskulti, ja ni havas nenion alian por fari.

Fakte, estis nek ien iri, nek rigardi ion. Ĉirkaŭe, kiel okuloj povis atingi etendiĝis la ruĝgriza dezerto.

— En la distanco de pli malpli cent metroj de ĉie tie — parolis Z. — troviĝis bordo de rivero. Bonvolu parkerigi tiun ĉi vorton. Rivero. Mi klopodos klarigi al vi ĝian signifon.

— Jes, ĝuste — vokis la ekskursantoj. — Rivero ? Kia ilo ĝi estas ?

— Ĝi ne estas ilo — lekciis Z. — Ĝi estas natura fluejo, ĉizita per akvo fluanta rekte el la fonto.

— Fluanta en la fluejo likvaĵo ? — grimacis la sinjorino interesiĝanta pri turismo. — Ja tio estas abomena ! Ni venis ĉi tien por plezuro ni ne volas aŭskulti pri fetoraj kanaloj !

— Iam riveroj estis plenigitaj per pura akvo elpaŝis kun nova revelacio Z. — Ili ne estis kanaloj, oni povis bani sin tie. Ĉe riveroj estis strandoj, kovritaj per ora sablo...

— Per la sablo en la koloro de fingro-ringo ? — ŝercis la junulo. — Por kio servis tiu ĉi valorega sablo ?

— Ĝi servis al kuŝado kaj sunbruniĝado — diris Z.

— Kion signifas « Sunbruniĝado » ? — oni demandis.

— Ĉi tio estas pli malfacila afero — konfuziĝis Z. La fenomeno, kiu postulas kompreni pasintecajn kondiĉojn, kiuj regis sur nia globo, kiam ankoraŭ sur la surfaco de la Tero estis videbla la Suno.

— Kiel do ? neniu kaŝis sian mirkonsternon — la Suno ?

— Ne estis ankoraŭ tiom da fumo en la atmosfero — rakontadis Z. — La sunradioj atingadis la Teron, lumigante la personojn kuŝantajn sur la sablo efikis tiel, ke okazadis ŝanĝojn en la pigmento de la haŭto, kio kaŭzis ĝian bruniĝadon. Tio populare nomiĝis « sunbruniĝado ».

— Kiacele iu devus okazigi ŝanĝojn sur haŭto ? — oni miris ĉirkaŭe. — Plena absurdo !

— Verŝajne estis agrable sunbruniĝi — diris Z.

— Ne, tio estas iuj sensencaĵoj — indigniĝis iu aĝa sinjorino. — Montriĝas, ke sen gvidanto ne valoras fari ekskurson...

— Tia bruniĝinta ulo mergis sin poste en la akvo — rikanis jam malkaŝe la junulo. — Li ne abomeniĝis, mergis sin en ĝi heroece, nur tial, por pli bruniĝi.

— Ni revenu jam — mi diris, ĉar mi ekdomaĝis Z. Eble li fakte parolis absurdaĵojn, certe li ne estis tute normala, sed ĉu tio estas lia kulpo ? La vivo estas tiel nervoza, ne ĉiu eltenadas ĉiutagajn vizitojn ĉe psikiatro...

— Sufoke — diris la sinjoro faldigante la seĝon. — Ĉu iu el vi gesinjoroj havas okaze pastelon da akvo ?

— Mi donis al li kvaronon de la mia, kvankam la nekstan porcion mi ricevos venontsemajne.

— Ne valoris ekskursi sen profesia gvidanto — ripetadis la aĝa sinjorino enirante la aŭtobuson.

Kun la gvidanto aŭ sen li mi jam ne plu emis ekskursi. Estis varmege, ĉirkaŭis nin la grizruĝa polvo, kaj la buŝaĵo de la nova masko por spirado dolorige premis niajn lipojn.

Tradukis Antoni Madej el pola turisma revuo « Światowid ».

Japanaj rakontoj

La monta pasejo ĵumonĵi tooge

Mia amiko diris al mi : « Mi ne komprenas, kial mi tiel profunde memoras tiun tiaman okazaĵon ».

Estis meze de aŭtuno... Tio okazis, kiam ni transiris la montan pasejon apartigantan ĵumonĵi-tooge de Hakutaisan ; ni grimpis el Tocimoto ; tiam ĉe la monta pasejo ni renkontiĝis kun viro, kiu ŝajnis al ni vilaĝano ĉirkaŭ kvardek-jara. Sur la dorso li portis infaneton ; li vagis kun papereto en mano. Li rigardis nin kaj sur lia mieno aperis trankvileco kaj li demandis nin : Kiom da distanco estas de ĉie tie al Ĉiĉibu-oomija ? Tuj ni rimarkis sur lia vizaĝo melankolion kaj zorgon. Ni precizigis al li pri la distanco.

Ni eksciis, ke li estas viro de vilaĝo Kaŭahage, situanta sub Kanemine. Li klarigis, ke lia infaneto estas febro-malsana kaj, tial li devas viziti, kun la etulo, kuraciston, kiel eble plej frue. Vilaĝanoj instruis al li, ke li pli rapidos al bona kuracisto laŭsekvante la montan pasejon ĵumonĵi-tooge al Ĉiĉibu-oomija, pli ol laŭirante la riveron Ĉikumae-gaŭa ĉe Iŭmurata ĉe Saku.

Sed ĉar li neniam transiris la montan pasejon, li ricevis de la vilaĝanoj la papereton, sur kiu mapo estas desegnita.

La infaneto, sur lia dorso, senĉese malalte ĝemitis. Tiu ĉi monta pasejo estis plen-kovrata da aceroj. La viro salutis nin kun dank-esprimo ; kaj li derompis branĉeton de acer-arbo kaj levis ĝin super la frunton de sia infaneto ; dorlotante lin, li, kurbiĝinte, rapid-paŝe laŭiris la montan pasejon.

Kvankam lia figuro tuj malaperis kaj malvidebliĝis en la sereneco de tiu monta vojo, de tiu nuba tago, trankvila kvazaŭ akvo, ĉe niaj oreloj restis, dum kelka tempo, la febla ĝemeto de la febro-malsana infaneto, kiu, pli kaj pli, malproksimiĝis.

Mia amiko diris : « Mi sentas en mia koro ian malpezan lamentadon tian, kia ĝi estas kantata en « Ballades françaises de Paul Fort » (Francaj Baladoj de Paul Fort).

Kompreneble, tio estas malgranda okazintaĵo ankaŭ por mi. Sed ankaŭ en mia koro, ĝi restas impreso neapartigebla de la monta pasejo.

Noto de la tradukisto.

Ooshima Ryookochi. Li naskiĝis en la jaro 1899. Li estis fame konata alpisto en Japanujo. Marton en la jaro 1928, li grimpis la monton Tengudake kaj la monton Iodake kaj iris al la monto Hodaka, kie neĝis kaj neĝis. La 25-an de marto en la proksimeco de la kvara supro de la norda Mae-hodaka, li malaperis en la densan nebulon. Tiam li estis tridek-unu-jara. Post lia morto liaj verkoj pri montoj estis eldonitaj. Japana alpismo estas multe pli praktikita dank'al li.

Tradukis Kozi Sato.

La vino, kiun mi trinkis kun mia patro

Mia patro tre ŝatis trinki vinon kaj suferis pro alta sango-premo, kio ja estas normala konsekvenco ĉe trinkemuloj.

Li ofte diris al mia patrino, kiu atente zorgegis pri sia edzo kaj volis, ke li ĉesu trinki vinon :

« Trinki vinon estas mia nura plezuro ; ĉu vi volas tion forigi de mi ? Tiam liaj okuloj esprimis profundan solecon, kiu ĉiis en mia koro : estis ne nur soleco de patro sed soleco de tuta solulo.

« Mia patro vivis sian tutan vivon kiel ŝtrumpoteksisto. Kiam li estis dudek-du aŭ dudek-tri jara, lia mano estis kaptita de la maŝino. Tial li estis vundata je la kubuto ; poste li estis operaciata, kaj bedaŭre lia maldekstra brako restis pli mallonga ol la dekstra. Mi supozas, ke estas post tiu akcidento, ke li iĝis trinkema. Sed lia metia tekniko estis tiel bona, ke la sammetianoj nomis lin « la Dio de ŝtrumpoj ».

Longe li rigardis min kaj la vizaĝon de sia malsana edzino. Mi estis ankoraŭ 2-3-jara infaneto, kiam li alkutimigis min al vino.

Denaske mi estas hontema kaj ju pli mi maljunuĝis des pli mi fariĝis tia. Kutime mi restis en mia ĉambro, escepte kiam mi vizitis la lernejon. De tempo al tempo mia patro deziris promeni kun mi : tion li nomis : « la rekta lernado pri socio » ; la plej ofte ni vizitis trinkejon. Tamen baldaŭ mi devis min prepari por lernejaj ekzamenoj kaj mi ne plu povis promeni dum vespero aŭ dum nokto.

Sed kelkfoje mia patro malfermis la kulisan pordon de mia ĉambro kaj diris : « Kazuko, ci ankaŭ trinku iomete da vino ; tro da studado estas malbona por cia sano ».

Li eniris en mian ĉambron, portante boteleton da sakeo (japana vino). Trinkinte mi diris jen « dolĉa vino », jen « forta vino », jen « kie tiu ĉi sakeo estis farita ? » k.t.p. kvazaŭ mi konus la veran bongustecon de sakeo. Mia patro tiam estis feliĉa trinki sakeon kun mi. Kelkfoje mi ne sciis je kio okupiĝi. Tian vesperon mi diris : « venu paĉjo, mi regalos vin » ; li respondis « ĉu vi ne volas fiŝhoki sparon per kankro ? » (kiu volas diri : ĉu vi donas ion etan por gajni ion grandan ?).

Sed tamen li ĝoje gvidis min sur la noktan straton kaj fine mia patro estis trinkanta vinon kun sia filino, kiu estis pli altkreska ol li kaj ŝajnis virineca. Pri tiu sceno la aliuloj eble pensis : ne estas patro kun filino, sed geamantoj !

Tiuokaze mia patro demandis min : « Kiun vinon kaj kiun manĝon ci mendas ? ». Per kia afekta voĉo li tion diris ! Mi ne povis ne ridi !

Al mia patrino li ofte diris : « Kiom ajn mi maljuniĝos, mi ne estos prizorgata de miaj gefiloj, ci...

Certe, certe, kiel tiu ĉi lia vorto, li mortis subite en sia lito, de neniu rimarkata. Li mortis de korparalizo.

Pli poste mi trovis kelkajn boteletojn por sakeo kaj tasetojn, kiujn li, laŭ mia supozo, subŝtelis, por rememoro, en iuj trinkejoj. Mi ilin metis en la ŝrankon.

Ĉar strange, post la morto de mia patro, mi ne plus povis trinki vinon, tiuj aĵoj ne plu estis necesaj. Sed kiam mi malfermas la ŝrankon, iel ajn, ilia vidaĵo konsolas kaj trankviligas min. Ŝajnas al mi, ke boteletoj kaj tasetoj murmuras per la voĉo de mia patro : « Kazuko, trinku vinon malofte ».

Noto de la tradukisto.

La verkistino : Kazuko Yamasaki ne estas verkistino sed ordinara japana laborulino. Ŝi estas Tokianino. Kompreneble, estas en iu libro, ke mi legis tiun verketon ; persone mi ne konas ŝin. La rakonto plaĉis al mi.

Mi nur esperas, ke alilandaj geamikoj trovu tie unu tipon de japana temperamento.

Tradukis, Kozi Sato.

ŜERCETO

de A. CEKOV

Hela vintra tagmezo... La frosto estas forta, krakas, kaj al Nanjo, kiu tenas min je la brako, la arĝenta prujno kovras la krispojn sur la tempioj kaj la lanugeton sur la supra lipo. Ni staras sur la alta monto. De niaj piedoj ĝis la tero mem etendiĝas dekliva platajo, en kiun la suno sin rigardas kiel en spegulon. Apud ni malgranda glitveturileto tapetita de helruĝa ŝtofo.

— Deglitiĝu malsupren, Nadeĵda Petrovna! — petegis mi —. Nur unu fojon! Mi certigas vin, ke estos nenia danĝero al ni.

Sed Nanjo timas. La tuta spaco, de ŝiaj malgrandaj galoŝoj ĝis fino de l'glacia monto ŝajnas al ŝi timiga, nemezurebla abismo. Ŝia animo ŝanceliĝas kaj la spirado haltas, kiam ŝi rigardas malsupren, kiam mi nur proponas sidiĝi en la glitveturileton, sed kio do fariĝos, se ŝi riskus flugi en la abismon? Ŝi mortos, ŝi freneziĝos.

— Mi petegas vin! mi diras. Oni ne devas timi! Komprenu do, ke tio ĉi estas kuraĝmanko, timemo!

Nanjo fine cedas, kaj mi laŭ aspekto de ŝia vizaĝo vidas, ke ŝi cedas kun danĝero por vivo. Mi sidigas ŝin palan, tremantan en la glitveturileton, ĉirkaŭprenas ŝin per la brako kaj kune kun ŝi ĵetiĝas en abismon. La glitveturileto flugas kiel kuglo. Disfendita aero batas la vizaĝon, bruegas, fajfas en la oreloj, dolore ŝiras, furioze pinĉas, kvazaŭ kapabla forŝiri el la ŝultroj la kapon. Pro premo de l'vento oni ne havas forton spiri. Ŝajnas, ke diablo mem ĉirkaŭprenis nin per siaj manegoj kaj kun blekego nin tiras en la inferon. La ĉirkaŭantaj objektoj turnevolviĝas kaj formas longan, rapidege postkurantan masonon... Jen-jen ankoraŭ momento kaj ŝajnas, ni pereos.

— Mi amas vin, Nanjo! diras mi duonvoĉe.

La glitveturilo komencas gliti ĉiam pli malrapide, bruego de l'vento kaj zumado de l'glitiloj jam ne estas tiel timigaj, la spirado ĉesas kvazaŭ morti, kaj ni, fine, nin trovas malsupre. Nanjo estas duonviva, duonmorta. Ŝi estas pala, apenaŭ spiras... Mi helpas, ke ŝi sin levu.

— Neniaokaze aliafoje mi veturos, — diras ŝi, rigardante min per grandaj plenaj de teruro okuloj.

— Ne por io en la mondo! Mi preskaŭ mortis!

Iom poste, ŝi rekonsciiĝas kaj jam demande rigardas miajn okulojn : ĉu mi diris tiujn kvar vortojn, aŭ ili nur ŝajne ekaŭdiĝis al ŝi en la bruado de l'ventego? Kaj mi staras apud ŝi, fumas kaj atente esploras mian ganton.

Ŝi prenas min je la brako, kaj ni longe promenas ĉirkaŭ la monto. La enigmo, videble, maltrankviligos ŝin. Ĉu estis diritaj tiuj vortoj aŭ ne? Jes aŭ ne! Jes aŭ ne? Ĝi estas demando de la memestimo, honoro, vivo, feliĉo, la demando tre grava, plej grava en la mondo. Nanjo senpacience, malgaje, per penetranta rigardesprimo enrigardas mian vizaĝon, respondas malĝuste, atendas, ĉu mi ne ekparolos. Ho, kia ŝanĝesprimado de tiu ĉarma viraĝo, kia ŝanĝesprimado! Mi vidas, ŝi batalas kun si mem, ŝi bezonas diri ion, demandi pri io, sed ŝi ne trovas la vortojn, estas al ŝi ne oportune, terure, ĝojo malpermesas...

— Ĉu vi scias, kio? — diras ŝi, ne rigardante min.

— Kio? demandas mi.

— Ni ankoraŭ unu fojon... glitu.

Ni surrampas sur ŝtuparo la monton? Denove mi sidigas palan, tremantan Nanjon en glitveturileton, denove ni flugas en teruran profundegaĵon, denove bruegas la vento kaj zumas la glitiloj kaj denove dum plej forta kaj brua trapasado de la glitveturileto, mi diras duonvoĉe :

— Mi amas vin, Nanjo!

Kiam la glitveturilato haltas, Nanjo ĉirkaŭrigardas la monton, sur kiu ni ĵus glitis, poste longe enrigardas mian vizaĝon, aŭskultas mian trankvilan kaj senemocian voĉon, kaj tuta, tuta, eĉ ŝia mufo kaj baŝliko, tuta ŝia teniĝo montras ekstreman malkomprenon. Kaj sur ŝia vizaĝo estas skribite : — Kio do estas? Kiu diris tiujn vortojn? Ĉu li diris aŭ mi ŝajne aŭdis?

Ĉi tiu malcerteco maltrankviligas, malpaciencigas ŝin. La kompatinda knabineto ne respondas demandojn, sulkas la vizaĝon, estas preta ekplori.

— Ĉu ne iros ni hejmen? demandas mi.

— Kaj al mi... al mi plaĉas tiu glitado, — diras ŝi, ruĝiĝante. — Ĉu ni ne veturu ankoraŭ unu fojon?

Al ŝi « plaĉas » tiu glitado, kaj dume, sidiĝante en la glitveturileton, ŝi, kiel dum antaŭaj fojoj, estas pala, apenaŭ spiras pro timo, tremas.

Ni malsuprenglitas trian fojon, kaj ni vidas, ke ŝi rigardas al mi en vizaĝon, observas miajn lipojn. Sed mi almetas al la lipoj la tukon, tusas kaj kiam ni atingis la mezon de l'monto, mi havas tempon diri :

« Mi amas vin, Nanjo! ».

Kaj la enigmo restas enigmo. Nanjo silentas, pri io pensas... Mi akompanas ŝin de l'glitkurejo hejmen, ŝi pensas iri malrapide, malrapidigas la paŝojn kaj ĉiam atendas, ĉu mi ne diros tiujn vortojn. Kaj mi vidas, kiel doloras ŝia animo, kiel ŝi faras penadojn por ne diri :

— Ne povas esti do, ke ilin parolis la vento! Kaj mi ne volas, ke tion parolis la vento!

Sekvantan tagon, matene, mi ricevas la letereton : « Se vi iros hodiaŭ al la glitejo, nu do, alprenu min. N. ».

Kaj de tiu tago, mi kun Nanjo komencas ĉiutage viziti la glitejon, kaj flugante malsupren en glitveturileto, mi ĉiufoje elparolas duonvoĉe tiujn samajn vortojn : — « Mi amas vin Nanjjo! ».

Baldaŭ Nanjo alkutimiĝas al tiu frazo, kiel al vino aŭ morfino. Ŝi ne povas vivi sen ĝi. Vere, flugi de sur la monto kiel antaŭe, estas terure, sed nun jam teruro kaj danĝero aldonas apartan ĉarmon al vortoj de l'amo, vortoj, kiuj kiel antaŭe, prezentas la enigmon kaj turmentas animon. Estas ĉiam la demando pri la samaj du : mi kaj vento...

Kiu el ambaŭ konfesas al ŝi amon, ŝi ne scias, sed al ŝi, videble, jam estas tute egale; el kiu ajn vazo drinki — tute egale, nur esti ebria.

Iufoje dum tagmezo mi solece direktis min al la glitejo, meze de popolamaso, mi vidas, kiel Nanjo aliras al la monto, kiel ŝi serĉas min per la okuloj... Poste ŝi timeme iras supren sur la ŝtupareto... Terure, veturi sola!... Ho, kiel terure!...

Ŝi estas pala kiel neĝo, tremas, iras kvazaŭ por ekzekuto, sed iras, ne rigardante reen, decide. Ŝi, videble, decidis fine eksprovi : ĉu estos aŭdataj tiuj mirindaj dolĉaj vortoj, kiam mi forestas? Mi vidas, kiel ŝi, pala, kun malfermita pro teruro buŝo, sidiĝas en la glitveturileton, fermas la okulojn, kaj adiaŭinte por ĉiam la teron, forŝoviĝas de la loko.... « Ĵ ĵ ĵ »... zumas la glitiloj. Ĉu aŭdis Nanjo tiujn vortojn, mi ne scias... Mi vidis nur, kiel ŝi sin levas de la glitveturilo, lacagita, malforta. Ĉu aŭdis ŝi ion aŭ ne. Kiam ŝi glitis malsupren, teruro forprenis de ŝi la kapablon aŭdi, distingi sonojn, kompreni...

Sed venas, jen la printempa monato Marto...

La suno fariĝas pli bela. Nia glacia monto malheliĝas, perdas sian brilon kaj degelas fine. Ni ĉesas niajn glitojn. La kompatinda Nanjo jam ne povas plu aŭdi tiujn vortojn, kaj neniu diros ilin, ĉar la vento ne bruegas plu, kaj mi intencas iri Peterburgon, por longa tempo, eble por ĉiam.

Iufoje, du tagojn antaŭ mia forveturo, dum krepusko mi sidas en la ĝardeneto, kaj de la korto, en tiu loĝas Nanjo, ĉi tiu ĝardeneto estas apartigita per alta najlofiksita tabulbarilo... Estas ankoraŭ iom malvarme, sub la sterko ankoraŭ estas neĝo, la arboj estas malvivaj, sed jam odoras printempo, kaj prepariĝante por dormo, brue krias la frugilegoj. Mi alproksimiĝas la barilon kaj longe rigardas tra fendo. Mi vidas, kiel Nanjo eliras sur la peroneton kaj direktas malgajan, sopirantan rigardon al la ĉielo... La printempa vento blovas al ŝi rekte sur la palan, malĝojan vizaĝon... kaj rememorigas al ŝi pri tiu vento kiu bruegis al ni ia sur la monto, kiam ŝi aŭdis tiujn kvar vortojn, kaj ŝia vizaĝo fariĝas malgaja, malgaja, larmo fluas sur la vango... Kaj la kompatinda knabineto etendas ambaŭ brakon, kvazaŭ petante ĉi tiun venton alporti al ŝi ankoraŭ unu fojon tiujn vortojn.

Kaj mi, atendinte la venton, duonvoĉe diras :

— Mi amas vin, Nanjo!

Dio mia, kio fariĝas al Nanjo! Ŝi ekkrias, ridetas je la tuta vizaĝo kaj etendas renkonten al la vento la brakojn, ĝoja, feliĉa, tiel bela...

Kaj mi iras min prepari por la forveturo...

Depost tio pasis iam longa tempo. Num Nanjo jam estas edziniĝinta : oni ŝin edzinigis aŭ ŝi mem edziniĝis — ĝi estas tute egala, — je la sekretario de l'nobela zorgadministrejo, kaj nun ŝi havas jam tri infanojn. Kiel ni kune iam iradis sur la glitejo kaj kiel la vento alportadis al ŝi la vortojn : « mi amas vin, Nanjo! » Tio ne estas forgesita; por ŝi nun ĝi estas plej feliĉa, plej kortuŝanta kaj ĉarma rememoro en la vivo... Kaj al mi nun, kiam mi fariĝis pli multaĝa, jam ne estas kompreneble, kiacele mi diris tiujn vortojn kaj kiacele mi ŝercis.

El la rusa lingvo tradukis Pepe (Bakuano).

POR VIA DISTRO

NIA KONKURSO

Rimarko

Ni memorigas al ĉiuj, ke nia konkurso 72-73 komenciĝis en la lasta numero de Kulturaj Kajeroj (N° 5 - Septembro-Oktobro). Ni akceptos ĝis la fino de Januaro 1973 la solvojn de la kvar unuaj problemoj (Du en la N° 5, du en la nuna numero).

UNUA PROBLEMO (20 poentoj)

El la ĉi-subaj frazoj, kelkaj estas korektaj, kelkaj ne korektaj. Bonvolu korekti la nekorektajn. Estos kalkulitaj po 2 poentoj por ĉiu eraro ĝuste korektita, sed estos forprenita po 1 poento por ĉui eraro « malĝuste » trovita.

1) Kiam mi vekiĝis, estis ankoraŭ mallumo.
2) Mi tiel kuris, ke mi ne povas retrovi la spiron.
3) Por kio taŭgas homo, se la tempo li uzas nur por manĝi, kaj por dormi ?
4) Plej bona estos, se vi ĝin forgesu.
5) La ortografio en la plimulto de lingvoj prezentas veran krucon por la lernanto. z
6) Se vi nepre volas edziniĝi, prenu malsaĝulinon.
7) Morgaŭ ni iros ĉe nia onklo.
8) Dank'al la akuzativon, Esperanto evitas multajn malklarajojn kaj malfacilajojn.
9) Ĝi estis juna homo je ĉirkaŭ dudek jaroj.
10) La okuloj estas plenaj de larmoj.
11) La vojo al Parizo pasas trans tiu-ĉi vilaĝo.

DUA PROBLEMO (10 poentoj)

SILAB-ENIGMO

AG AK AK AR BE BO BO CI DO DO DO ED FA GA GO GO GU IN IN JU KO KO KO LA LI LO LO LO MO NA NA NO NU ON OR OR OS OS PO PO RA RA SO SO SO TO TO TO TO TO UR VE ZO ZO.

El la supraj 54 silaboj formu 27 dusilabajn vortojn kun la jenaj signifoj :

1. Parto de la kapo.
2. Videbla sur la maro.
3. Sur la piedoj estas.
4. Staranta akvo.
5. Grandega birdo.
6. Akvero.
7. La rado havas.
8. Virina vestaĵo.
9. Mallibera viro.
10. Besteto en la lito.
11. En la korpo estas.
12. Ne havanta gepatrojn.
13. La veturiloj havas.
14. Skribilo.
15. Mortigilo.
16. Granda besto.
17. Ŝipoj havas ĝin.
18. La glavo havas ĝin.
19. Parto de la dramo.
20. Manĝata kreskaĵo.
21. Grava meblo.
22. Parto de la cirklo.
23. La birdoj havas.
24. Gravaĵo en ĉiu laboro.
25. Malbela besto.
26. Norda ĉefurbo.
27. Sur la ĉielo videbla.

La unuaj literoj de la ricevitaj vortoj donas gravan konsilon al la Cseh-metodaj kursgvidantoj.

AMUZAJ PROBLEMOJ

(apartaj de la konkurso)

Solvoj de la antaŭaj problemoj

KRUCVORTOJ

	1	2	3	4	5	6	7	8	9	10
1	M	E	D	A	L	I	O	N	O	J
2	U	T	E	R	O	■	P	I	K	E
3	L	E	P	O	R	O	■	K	■	N
4	T	R	O	■	D	R	E	S	I	■
5	I	O	N	I	O	■	S	O	N	O
6	P	■	I	D	■	E	T	■	T	E
7	L	E	T	A	L	■	R	E	I	R
8	I	L	A	R	■	L	A	R	M	■
9	K	A	J	O	L	A	D	O	■	I
10	I	N	■	J	A	R	O	■	B	O

ENIGMO

Por trovi la solvon de la enigmo pri la vivo de Zamenhof, oni devis fari la jenajn operaciojn :

1) 1859 × 12 = 22308
2) 22308 + 1917 = 24225
3) $\frac{24225}{15} = 1615$
4) 1615 × 14 = 22610
5) 22610 + 1887 = 24497
6) 24497 × 4 = 97988
7) 97988 — 1905 = 96083
8) 96083 × 3 = 288.249
9) 288249 — 44 = 288205
10) $\frac{288205}{5} = 57641$
11) 57641 — 1 = 57640
12) $\frac{57640}{2} = 28820$
13) 28820 — 4 = 28816
14) $\frac{28816}{16} = 1801$
15) 1801 + 5 = 1806
16) $\frac{1806}{2} = 903$
17) 903 + 57 = 960
18) 960 + 41 = 1.001

GRAMATIKO PER BONHUMORO

PREPOZICIOJ

La prepozicioj esprimas diversajn cirkonstancojn, kiujn oni povas tiamaniere arigi :
Loko : al, antaŭ, apud, ĉe, ĉirkaŭ, de, el, en, ĝis

kontraŭ, post, preter, sub, sur, tra, trans.

Tempo : antaŭ, ĉe, de, dum, ĝis, je, post.

Kaŭzo : de, por, pri, pro.

Maniero : anstataŭ, dank'al, kontraŭ, krom, kun, laŭ, malgraŭ, preter, sen.

Rimedo - Instrumento : Per.

Mezuro : Da.



Post invito

Estas Sinjoro Viktor, kun kiu vi konatiĝis dum via ĉeesto ĉe « Konferenco pri kontrolado de la naskiĝoj ». Responde al via invito, li venas por libertempi ĝis fino de la monato ; apud li, jen lia ĉarma familio !



Laŭ sperta kalkulo de familio-estro :

Trankviliĝu, karulino, malgraŭ la multaj flegadoj kaj medikamentoj en tiu hospitalo kaj dank'al Socia Asekurado, vi elspezas multe malpli da mono ol dum via vivo hejme antaŭ via malsano.



Kontraŭ enuo kaj diboĉemo...

— « Laboro estas sano » !

— Konsentite ! tamen post zorga purigado de la teleraro estas necese spiri freŝan aeron ; bona promenado en la ĝardeno estos por vi agrabla distraĵo.

Niaj perantoj

Aŭstrio : S-ro Johan Wieshofer, Wiener-Reichstrasse 2, LINZ (45 aŭstr. ŝil.).

Belgujo : S-ro Guyot Mateo, 18, rue Chefneux, BARCHON, Lg. (85 fr.).

Britujo : S-ro Frank Ashpole, 127, Midford Rd, Combe Down, BATH BA2 5Rx (15 ŝil.).

Ĉeĥoslovakio : S-ro Dezidero Koronczi, Nabrezie Metoda 1707/16, PRIEDVIDZA (2 us. dol).

Danlando : S-ro Ulrik Rasmussen, Norregardsvej 66, 2610, RODOVRE.

Finnlando : S-ro Joel Vilkki, SOMERO 9 - Pĉk. : Tu 60253 (9 mk.).

Germanujo Okc. : S-ro Joseph Bode, 35 - KASSEL-OBERZWEHREN, Hinter der Brücke 22, pĉk. Frankfurt (M) 2347 59-601 (6,2 mk.).

Hispanujo : S-ino Jozefino Monter Palomar, Muntaner 416, 1°, la, BARCELONO (110 pes.).

Italujo : Itala Esperanto-Federacio, Via Po 7, TORINO (1.000 lir.).

Japanujo : S-ro Tara Niŝiumi, 6-31-19 Kita-Koiwa Edogawa-Ku, 133, TOKIO - pĉ Tokio 44163 (640 jenoj).

Jugoslavio : Slovenia Esp. Ligo, Komenskega 7, LJUBJANA, poŝtfako 239 (1520 d.).

Nederlando : S-ro M. de Waard, Anemoonstraat, CAPELLE AAN DEN IJSSEL, ZH pĉk. 209721 (7 guld.).

Norvegujo : S-ino Marit Delor, Solveïen 143-B, LJAN.

Peruo : S-ino Skotte, Malecon Paul-Harris, 336, Dto 200 BARRANCO (Lima).

Pollando : Pola Esperanto-Asocio, Jasna 6, VARSOVIO.

Rumanio : S-ro Adrian Boldan, p.k. 1412, BUKUREŜTI - 6. (27 lei).

Sovetunio : S-ro Alik Melnikov, ab jaŝ 233 Rostov Don — 7.

Svedujo : S-ro Roland Dupuis, Helgagatan 36, uppg 13, STOCKHOLM Sö pĉk 157007 (10 kr.).

Svislando : S-ro Cl. Gacond, Miéville, 133 - 2314 LA SAGNE.

Tajlando : S-ro C.L. Unchitti, GPO box 1231, BANGKOK (2 us. dol.).

Usono : S-ro D.W. Hoffman, 1444 Leslie Street, HILLSIDE (N.J.) (2 dol.).

Aliaj landoj : Ni serĉas perantojn en aliaj landoj. Oni povas pagi la abonprezon per steloj (20 st.) aŭ respondkuponoj (12 respk.), per libroj aŭ per neuzitaj poŝtmarkoj. Sin turni al la Direktoro.



KASTELO GRÉSILLON

BAUGÉ
Maine-et-Loire
FRANCUJO

ESPERANTISTA KULTURDOMO

De junio ĝis septembro ĉiulandajn esperantistojn kaj eventuale iajn ajn karavanojn frue anonciatajn

Akceptas :

Por ripozi trankvile en atmosfero frateca ;
Por eklerni aŭ plulerni la internacian lingvon ;
Por ĝin praktiki per interŝanĝo de ideoj ;
Por aŭdi kulturajn prelegojn ;
Por studi specialajn problemojn ;
Por inter amikoj gaje libertempi ;
Por ekskursi tra centr-okcidenta Francujo.

VENU AL LA ESPERANTISTA KULTURDOMO

Kompleta Programo kun kondiĉoj havebla kontraŭ internacia respondkupono al :
ESPERANTISTA KULTURDOMO, Grésillon, BAUGÉ (Maine-et-Loire) Francujo

Sablé-sur-Sarthe. — Imprimerie Coconnier

Le Gérant : P. BABIN

Supplément au n° 6 de 1972, de « KULTURAJ KAJEROJ »

LA VIE DE GRÉSILLON

ENTRE NOUS...

Le compte rendu de la dernière réunion de notre Conseil d'Administration vous apporte dans ce numéro des renseignements sur le déroulement des stages d'été et sur le programme des activités pour l'année 1973. Vous y verrez également la liste des travaux projetés. Pourrons-nous tous les réaliser ? La forte augmentation des prix de l'alimentation entre juin et septembre a sérieusement entamé la marge de bénéfices que nous escomptions. Les réalisations envisagées risquent d'être amputées par les hausses déjà intervenues ou annoncées du prix des matériaux nécessaires aux aménagements. Nous ferons tout ce que nous pourrons faire... dans la limite des sommes disponibles.

Malgré cela nous voulons conserver à Grésillon son caractère de lieu ouvert au plus grand nombre. Le prix de pension ne doit pas être un obstacle. Nous y avons toujours veillé. Nous n'avons toujours opéré des réajustements que contraints et forcés par une augmentation des frais de fonctionnement et d'entretien. La dernière décision dans ce domaine était intervenue fin 1971. Nous ne pensions pas être obligés de revoir si vite le problème. Mais les augmentations ont été telles en 1972 que nous avons dû nous résoudre à une augmentation des prix de pension pour 1973. Cette augmentation ne fera d'ailleurs qu'éponger les hausses déjà intervenues et ne tient pas compte de celles qui nous attendent. Nous espérons que nos amis comprendront que ce n'est pas de gaîté de cœur que nous avons pris cette décision. Nous avons choisi de ne pas diminuer notre effort d'amélioration des conditions de vie au château dont en fin de compte tout le monde bénéficiera.

Un sérieux encouragement nous est venu des dons reçus. Le nombre de parts de sociétaires souscrites est également en augmentation par rapport aux années précédentes. Le cercle de nos amis s'agrandit. Nous ne les décevrons pas.

P. BABIN.

SUCCES AUX EXAMENS

Atesto pri simpla lernado :

Villégier René, Villégier Marie-Louise, Pierre Alain, Audier Daniel, Courvoisier Gaby, Dupuis Geneviève, Mongilardy Renée, Brémond Philippe, Babin Louis-Nicolas, Duc-Goninaz Christian, Duc Goninaz Hélène, Duc Goninaz Phhilippe, Flahaut Jean-Bernard, Galeazzi Antoine, Germain Dominique, Kauffmann Paule, Royer Pierrette, Wynholds Janine.

Atesto pri praktika lernado :

Bourot Suzanne, Bréhier Jean, Delsarte Annie, Gallon Emilienne, Le Goff Claude, Magniez Gérard, Mongilardy Renée, Duc Goninaz Arlette, Duc Goninaz Philippe, Galeazzi Antoine, Germain Jean, Kraemer Joseph, Le Magadur Yannick, Orti Julien, Rouet Jean-Louis, Sidobre Guy, Winholds Janine.

Atesto pri kapableco :

Duc Goninaz Arlette, Masclet André, Naudé André.

Nos félicitations à tous.

PHILATELISTES

N'oubliez pas que nous tenons à votre disposition de magnifiques séries de timbres de Roumanie. Nous vous les offrons à 50 % de la cote. Envoyez 10, 20, 30 ou 50 francs à : M. Lucien Giloteaux, 3/10, allée Béranger, 59170 Croix - C.C.P. Lille 2 269 89.

NOS JOIES

Monsieur et Madame Pierre BABIN

sont heureux de faire part à tous leurs amis du mariage de Dominique *avec* Nicole Germaneau *à la Mairie de Baugé, le 30 Décembre 1972*

Tous les amis espérantistes se réjouissent de cette bonne nouvelle, ils présentent aux parents leurs félicitations, et à Nicole et Dominique leurs meilleurs vœux de bonheur.

⁂

Maggy Stuit, fille de notre ami Sipke Stuit, nous fait part de la naissance de son petit garçon François. Nous félicitons les parents et souhaitons à François longue et heureuse vie.

LA REVUE

Les amis qui n'ont pas encore réglé leur abonnement 1972, nous rendraient service en se mettant en règle au plus tôt. Cela nous éviterait un contrôle de fiches, opération longue, et un rappel toujours gênant qui nous occasionne une perte de temps. Nous les remercions à l'avance.

MEMBRES BIENFAITEURS (Suite)

S-ro Mathé (86)	*15,00*
S-ino Jacquesson (86)	30,00
S-ro Durand (09)	15,00
S-ro Serre (66)	50,00
S-ro A.-M. Bentz (34)	15,00
S-ino Amariglio (92)	15,00
S-ino Lavallée (76)	20,00
S-ro Ringotte (59)	15,00
S-ro Curnelle (59)	15,00
S-ro uerick (62)	15,00
S-ro Peraire (33)	15,00
S-ro Futran (U.S.A)	20,00
S-ro Belane (Hongrie)	15,00
S-ro Fourreau (69)	25,00
S-ro Kuhn (All. Féd.)	25,00
S-ro Valluet (45)	15,00
S-ino Meunier (45)	25,00
S-ro Orti (94)	15,00
S-ro Robert (13)	15,00
S-ro Bouquin (59)	15,00
S-ro Jouvin (76)	30,00
S-ro Petit (93)	30,00
F-ino Leclercq (80)	20,00
S-ro Schurad (All. Féd.)	15,00
S-ro Boissou (75)	15,00
Total :	*500,00*

CONSEIL D'AMINISTRATION du 22-10-1972

La séance est ouverte à 10 heures sous la présidence de M. Babin.

Etaient présents :

Mmes et MM. : Babin, Benistan, Chevallier, Cheverit, Cirét, Dairon, Guillot, Jacquesson F., Jacquesson P., Jelenc, Mathé, Métivier, Micard, Prévot.

Absents excusés :

Mmes et MM. : Bodereau, Benazet, Boyer, Guillaume, Lemagadur, Philippeau, Vazon.

A) — Compte-rendu des satges de l'été :

M. et Mme Babin ont animé un stage de 90 personnes sans problèmes marquants : les cours ont été suivis régulièrement, ainsi que les activités annexes (reliure, vannerie, émaux). Une rencontre d'enfants a eu lieu avec initiation à l'espéranto. M. Babin pense qu'il est difficile de faire plus et d'organiser des séjours d'enfants à Grésillon. Ont été organisés également une présentation de La Reto et la célébration du 20e anniversaire de la Maison (banquet et visite sur la tombe de M. Micard).

Jean-Paul et Janette Guillot se sont occupés de la Quinzaine espérantiste à laquelle participaient environ 70 personnes ; furent organisées cinq conférences sur les associations espérantistes ainsi que d'autres d'intérêt plus général ; les activités annexes ont surtout consisté en vannerie ; il y a deux excursions à l'extérieur et une à Baugé. Pour le 20e anniversaire les personnalités locales et les représentants des Conseils Municipaux de Baugé, St-Martin et Pontigné ont participé à un vin d'honneur au Château le 27. Ces rencontres semblent avoir permis de développer les liens entre la M.C.E. et l'extérieur.

Guy et Monique Dairon avaient un stage de 90 personnes dont 20 du précédent pendant la 1re semaine ; après leur départ il y a eu une rupture de rythme au début de la 2e semaine ; la 3e semaine a été très calme, le séjour s'étant écourté du fait de l'avancement de la date des examens. Les cours pour les enfants de Baugé ont posé un certain nombre de problèmes du fait du manque d'assiduité et du bas niveau des élèves, ce qui a beaucoup gêné les adultes. Activités annexes : trois excursions très suivies à Angers ; le Lude et Azay-Langers — caves de Bourgueil — atelier photo, reliure, émaux, vannerie.

M. et Mme Ciret ont animé les deux premières semaines de septembre où il y avait environ 40 participants ; rien n'était prévu pour la deuxième semaine, ce qui a provoqué quelque surprise chez les gens.

B) — Aperçu financier :

Disponibilités actuelles :

B.N.P. : 16.198
Caisse : 2.436
C.C.P. : 39.683
C.E.P. : 21.000 soit environ 80.000 francs.

Il reste encore quelques factures à payer (S.P.A.R., boulangerie, S.E.B. La Flèche). Les recettes-séjour s'élèvent à 125.682 francs, mais les dépenses en alimentation notamment sont supérieures de 10.000 F à celles de l'année dernière ; le bénéfice sera probablement inférieur à celui de l'année dernière.

Prêt Robert : M. Babin évoque ensuite le prêt de M. Robert : 12.000 F sous forme de chèque ; il propose la transformation de ce prêt en parts de sociétaire pour éviter toute confusion ultérieure quant au remboursement ; la formule parts actionnaire remboursable en 5 ans est adoptée.

Collecte pour la salle des Conférences : M. Benistan précise que « l'Association Culturelle » a collecté environ 2.000 F. Un effort sera à développer du côté des « Amis de Grésillon ».

C) — Programme 1973 :

— **Fin Novembre** : U.D. - C.G.T. Ponts et Chaussées : 4 jours à 25 personnes qui acceptent un supplément de cotisation pour chauffage ; administration : **M. et Mme Ciret.**

— **Noël** : le Conseil est informé par M. Babin du mariage de son fils Dominique. Le Conseil met le Château à la disposition de la famille Babin pour cette époque.

— **Pâques :**
11-18-4 : semaine culturelle J.E.F.O. : M. et Mme Babin.
18-25-4 : à ma charge de la Maison : M. et Mme Jelenc.

— **Mai :**
Dimanche 6 : Congrès Féd. Esp.
Dimanche 20 : M. Delaire

— **Juin : 10** (Pentecôte) : M. Petit.

— **Juillet-Aout-Septembre :**

Les cheminots allemands de Brandebourg aimeraient organiser une rencontre européenne qui aurait lieu pendant les semaines internationales (dernière semaine de Juillet - première semaine d'Août). Si ce projet ne se réalise pas cette année, une Semaine des Cheminots français aura lieu pendant la première semaine de Juillet : il faut leur réserver un certain nombre de places jusqu'à une certaine date. On peut prévoir :

1er au 22 Juillet :
1re semaine : cheminots,
2e semaine suivante : stage Lemagadur destiné aux membres du mouvement Freinet, une partie étant consacrée aux associations espérantistes, l'autre partie au déroulement normal des cours. **Babin.**

22-7-5-8 : Quinzaine Internationale. Fervojistoj ?
Jean-Paul propose d'adopter le principe d'activités alternant sur deux ans :
— projection sur l'extérieur (conférences variées, discussions).
— Etude d'un thème donné.
Adm. : **Guillot.**

5-26-8 : demander à M. Bodereau s'il prendrait la responsabilité de ce stage, trouver les professeurs.

26-8-8-9 : Adm : **M. et Mme Ciret.**

D) — Questions diverses :

M. Babin soulève ensuite le problème des prix pour l'été prochain. La question reste en suspens.

Travaux à effectuer : sanitaire des campeurs, escalier à refaire, w.c. intérieurs, chambre 7 et 33, aménagement des chambres du second assainissement de l'eau (filtre).

Problèmes d'imprimerie : fiches, fascicules pour cours du premier degré, carnets de chants, papier à lettre, vignettes du Château, cartes postales.

Contrat de Mme Covaisier : accordé sur la base de 500 F mensuel et de 1330 heures annuelles.

Le C.A. ayant épuisé l'ordre du jour se sépare à 17 h.

Le secrétaire de séance
F. Mathé.

POUR VOS COURS DE PERFECTIONNEMENT

Le livre qu'il vous faut :

POR LA PRAKTIKANTOJ

de **P. Babin**

Prix : **8,50 F.**

NOS COURS PAR CORRESPONDANCE

Cours 1er degré. — 16 livrets illustrés qui permettent d'acquérir les bases essentielles de la langue. Cours et corrections : 50,00 F.

Cours 2e degré. — 14 leçons présentées sous forme de feuillets. Permet d'acquérir une connaissance pratique de la langue. Cours et corrections : 50,00 F.

Cours 3e degré. — Excellent entraînement à un cours supérieur : versions, thèmes, étude de textes. Cours et corrections : 30,00 F. Nous pouvons fournir les livres de cours à ceux qui ne les possèdent pas déjà.

VOUS POUVEZ COMMANDER

Vos livres d'étude

Vos dictionnaires

Vos livres de littérature, poésie, théâtre, histoire, géographie, sciences, à notre Service Librairie

à M. CIRET
route de la Boulerie
VIEIL-BAUGÉ - 49150 BAUGÉ

Etablir les chèques de paiement à :

MAISON CULTURELLE ESPERANTISTE
C.C.P. Nantes 1485-39

Prix franco au-dessus de 10 Fr.

Demandez notre catalogue

NOUS TENONS EGALEMENT A VOTRE DISPOSITION :

Cartes postales de Grésillon : noires :	0,50 F.
couleur :	0,60 F.
Cuillères de collection :	9,00 et 12,00 F.
Pendentifs :	7,00 F.
Disques de stationnement :	3,00 F.
Etoiles pour vitres de voitures :	1,00 F.

et :

Les Héros Existentialistes

(texte français-esperanto)

de Colette Llech-Walter : **3,00 F.**

(plus frais d'envoi pour commande au-dessous de 10,00 F.).